# KATOLIKA SENTO

'71




4

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

**KATOLIKA SENTO**

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLIKA SENTO**

N-ro **4** - Aprilo 1971

**50a Jaro**



Sac. FERDINANDO LONGONI

Prezidanto de I.K.U.E.

ASEMBLEO DE UECI je la 14-a de marto 1971.

Dimanĉon, la 14-an de marto, okazis la ordinara asembleo de la "Unione Esperantisti Cattolici Italiani", U.E.C.I., laŭregule kunvokita per la oficiala organo Katolika Sento. La kunveno okazis en salono afable pruntita de la Franciskanaj Fratoj de la Antona ateneo kaj komenciĝis je la 10-a h. en la apuda preĝejo per celebro de sankta meso en Esperanto.
Je la 11 h. antaŭ bela nombro de ĉeestantoj, prezidanto P. Albino Ciccanti malfermis la kunvenon, proponante la diskuton de la diversaj temoj laŭ la tagordo.
Unue oni legis kaj aprobis la raporton de la antaŭa kunveno (10-an de majo 1970); poste oni parolis pri la financa situacio de UECI, prezentita de la kasisto doktoro C.C.Ferrari. Post kelkaj proponoj de la Vicprezidanto sac. F.Longoni kaj de la sekretario, ankaŭ la dua punkto estis unuanime aprobita. La tria punkto, pri la vivo kaj agado de la asocio, estis pritraktita de la prezidanto. Agnoskante, ke la plejparto de la malfacilaĵoj povas esti superataj per kunlaboro de ĉiuj asociitoj, oni proponis stimuli ilian kreskon kaj aktivecon. Aŭskultinte diversajn intervenojn, oni aprobis ankaŭ la trian punkton. Pri la 4-a parolis, salutite kun varma aplaŭdo, sac. Ferdinando Longoni, nova prezidanto de I.K.U.E., resumante la problemojn de la Internacia Asocio, kiuj dum ĉi tiuj lastaj jaroj fariĝis pli kaj pli malfacilaj, kiel bone konate de ĉiuj asociitoj. La postulo de resanigo de la asocio estis jam sentita en la kongreso de Limburg kaj decidita en tiu de Klagenfurt. Tiel la perletera elekto de la nova estraro signifis la firman volon de IKUE-anoj daŭrigi la vivon de sia asocio. Kvankam la ŝanĝoj okazintaj en la estraro estis frukto de la klara sinteno de nia UECI, ne estis certe la nur naŭ italaj voĉdonoj kiuj decidis

pri tio. Fakte UECI, kiu gvidadis la luktadon pere de nia "Katolika Sento", havas pli da aliĝintoj ekstere ol en Italujo. El la 93 voĉdonoj per kiuj oni elektis la novan prezidanton, 84 venis de ne italaj IKUE-anoj. Memorigante la evangelion, kiu temis pri la parabolo de la senfrukta figo, sac. Longoni diris: "Kiam mi ĵus kuncelebris antaŭ vi la meson kun itala kaj pola sacerdotoj, mi sentis pli intense la unuecon de la katolikaj esperantistoj, la respondecon, kiun la italoj havis dum ĉi tiuj malfacilaj momentoj, kaj la amon, kiu kunigas nin al tiuj, kiuj vivas laŭ multe pli malfacilaj kondiĉoj ol la niaj; kaj dum mi legis la evangelion de la tria dimanĉo de karesmo, mi ne povis ne apliki al mi mem la parabolon de la senfrukta figo: Jam tri jarojn aŭ preskaŭ tri IKUE ne bone fartas - ŝajnas, ke la Sinjoro diras al mi-; por kio ĝi estas ankoraŭ en la mondo? Kaj mi respondas: Permesu, ho Sinjoro, ke mi klopodu ankoraŭ ĉi tiun jaron. Mi ĉirkaŭfosos la teron, mi alportos sterkaĵojn". Fakte mia laboro ne estos multe pli brila ol ĉi tio. Sed la Sinjoro, kutime per ĉi tiuj humilaj klopodoj fruktigas sian kampon". Kaj pastro Longoni, turninte sin al ĉiuj IKUE-anoj, reprezentitaj de la ĉeestantoj, petis de ili preĝojn por ricevi la helpon de Dio, en sia malfacila tasko; alvokis multajn abonantojn al Espero Katolika kaj skizis siajn projektojn pri ĝi. Tiam, ĉar la diskutado de la tagordo estis elĉerpita, prezidanto P. Ciccanti malfermis la asembleon je la 13-a horo.

LA PROPAROLANTO DE LA S.SEĜO, respondante en nome de la Papo al la letero de la IKUE-Prezidanto, sac. Ferdinando Longoni, deklaris, ke lia Sankteco kun varmaj vortoj dankas lin kaj benas ĉiujn de li reprezentitajn. Sed samtempe li diras, ke ne ŝajnas opor

tune anonci la paskan saluton en la esperanta lingvo. Kvankam oni ne donas la motivojn, oni facile subkomprenas ke la neoportuneco devenas el la ne sufiĉe vasta nombro, kiun oni kalkulas al Esperantujo. Ĉu post la enkonduko de la Internacia Lingvo en la Ŝtatajn Lernejojn tiu opinio povos ŝanĝiĝi? Verŝajne oni devas atendi, ke kelkaj gravaj nacioj decidu aldoni oficiale Esperanton al la lernejaj programoj. Longa vojo; sed oni certe atingos la celon, se ni kuraĝe persistos en niaj klopodoj: "Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan."

UECI kaj CECR bondeziras al siaj aliĝintoj ĉiujn diajn gracojn okaze de la paska soleno.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
N° 92

DIMANĈON la 21-an de februaro la Roma Grupo inaŭguris la Semajnon de Internacia Amikeco per aŭskultado de kantoj inspiritaj de frateco kaj solidareco, inter kiuj "Donu al mi vian manon" de Ramona van Dalsen (kiu fariĝis la himno de la Semajno), "La Espero", kaj la "Himno de la Eŭropaj Federistoj", kies aŭtoro estas la prezidanto mem de la Roma grupo, Alberto Menabene. La postan dimanĉon, okaze de la fermo de la Semajno, prof.ino Carolina Minnaja, prezidanto de la Roma Esperanta Katedro, disdonis unuagradajn diplomojn. Antaŭ la multenombra ĉeestantaro, kiu plenigis la salonon de la kunveno, s.ano Luigi Minnaja per inspiri

taj vortoj salutis la novajn esperantistojn, memorigante, ke celo de la Internacia Lingvo estas malfermi novajn horizontojn per amo al ĉiuj homoj trans la faliginta muro de la diverseco de la lingvoj. Por ke la simpla ceremonio estu pli memorinda, li substrekis ĝin per la jena poemeto:

BONVENON, NOVA SAMIDEANO!

La kordoj vibras de moderna liro,
dum ĉarme sonas pro intima festo
lirika kanto je sereninspiro:
ĝi estas gaja signo de kunesto.

Regadas en l' aero nova sento:
fekunda intergenta solidaro,
kiun prigardas vigle kun kontento,
en ĉiu land', la nobla loĝantaro.

Se l' idiomo jam de vi lernita
personojn bonajn kaptas kaj katenas,
ĝi venas de mistera fort' spirita,
ĉar altajn celojn l' idiom' entenas.

Aspiro ĝia estas: "en la mondo
libero, justo, paco, karitato;
homar' fariĝu familia rondo".
Ja ĉiu homo estas nia frato!

Trans la obstakloj de la ŝtatolimoj
batadas koroj fremdaj sed amikaj;
kaj samaj sentoj nestas en l' animoj,
vokantaj nin al pensoj bonetikaj.

Aŭdiĝas voĉ' sopira, kvazaŭ krio,
de buŝ' al buŝo en la nokt' obskura:
al la bonvola vasta homsocio
ĝi nin invitas per parolo pura.

Malhelpas tamen lingvaj baroj krude
de politika ŝovinisma vanto,
kiu subpremas la popolojn trude;
sed barojn fordetruos Esperanto.

Restu kun ni fervore, man' en mano;
bonvena estu, nov-samideano!

Luigi Minnaja

La festo fermiĝis en apuda restoracio, kie kvindeko da samideanoj kunvenis por komuna tagmanĝo en gaja atmosfero de amikeco.

ALIĜIS AL UECI-CECR kun la bulteno: Romo: G. Bonardi; L. Bracco Angeleri; M. Macrí; A.R. Ludovisi; B. Benassi; Aosta: A. Falcoz; Ascoli Piceno: L. Gabrielli; Bollate:(MI) L. Zacché; Bolonjo: G. Gimelli, E. Grupo; S. Albertazzi; Firenzuola d'A.(PC): P. Braibanti; Fogliano (UD): I. Pellis; Ĝenovo: F. Bianchi; F. Rebora; Ghilarza (CA): E. Sias; Livorno: Neri Lami; Mantova: G. Zacché; Milano: Valvassori Peroni; E. Grupo; Eco d. Stampa; Padova: G. Saggiori; Pisa: E. Grupo; Pistoia: U. Stoppoloni; Porretta Terme(BO). C. Pivari; Ravenna: A. Duranti; Rimini (FO): A. Gambuti; A. Ciccanti; Ronchi d.L.(GO): M. Fabbro; S. Bonifacio (RA): N. Ghellere; Ternengo (VC): L. Garzia; Tirolo (BO): F. Knoflach; Torino: C. De Lorenzi; Trento: E. Grupo; Treviso: G. Brecevich; Centro Stud. Catt. Udine: A. Blasoni; Venecio: R. Ferrero; Vercelli: L. Sola; Verona: F. Ruaro; A. Vallotto; Andoro: R. Cas

tello; Aŭstrujo: Lisl Oberlechner; Britujo: I.F.Twilley The Brit.E.As.; N.Vigar; Ĉeĥoslovakio: B.Bulikovà; J. Lukes; M.Vecerovà; J.Chvosta; Ĉinio: "Popola Ĉinio" Hispanio: M.Casanoves; Romero Gomez; Hungario: K. Skultety; I.Vàgò; M.Balai; Jugoslavio: R. Blazevic; Nederlando; T. Đurenkamp; H.Wannemakers; G.Gene - sis; Novzelando: J.B.Hamvai; Pollando: W.Majewski; S.Pawlikowski; T.Sobiech; T.Kuczkiewicz; Rusujo : I.Gediminas; Z.Korn; Tajlando: M.Perray.
Entute: 341

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p.Jacobitti, nur avertante lin pri tio . Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sed estas petataj sendi al p.Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebri(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p.Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

BONFARA KASO: £.10.000 N.N. el Ĉeĥoslovakio; 2.000 E.Sias; F.Casar; 1.500 N.Dell'Aringa; 1.000 D.Zacché; Don Lodoviko; O.Sias; malgrandaj oferoj : A.Signore; V.Di Tocco; N.Vessella. Ni transdonis al danĝerigita s-ano en Rumanujo £.20.000. kaj £.20.000 al maljunaj s-aninoj, por paska donaceto.
Restas £. 12.825.

RADIO ROMA-ESPERANTO. Aprilo 1971-a.
Dimanĉon la 4-an: La tuta mondo interesiĝas pri la savo de Venecio; la 11-an: la Suditala regiono Lukanio ; la 18-an: RAkonto por infanoj; la 25-an: la antikva Greka Kafejo en Romo. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendoj

okazas de h. 21.00 ĝis h. 21.20 (M.E.T.). Ondlon - goj: m. 30,90 - 41,24 - 50,08.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de Katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l' Eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

OKAZE DE LA PREZENTADO de kandeloj al la papo laŭ la liturgio de la 2-a de februaro, la papo diris:"Ĉi tio memorigas al ni kortuŝan kaj belegan scenon de nia ĵusa vojaĝo al Ekstrema Oriento, en la dumnokta meso ĉe la stadiono de Ĝakarto. Okazis tiel: komence de la meso, venis antaŭ nin altarservanto, petante, ke ni lumigu al li kandelon: tion ni tuj faris. Ĉi tiu kandelo estis portita por lumigi aliajn similajn kandelojn en la manoj de aliaj altarservantoj, kiuj de unu al la alia propagis en la senmezura fidelulamaso la kandellumigadon. La tuta stadiono rapide fariĝis kiel stelaro briletanta, pro sennombraj lumoj. En la momento de la hostilevado la lampoj, kiuj prilumis la stadionon, estis estingitaj, nur restis luma tiu, kiu superstaris la altaron, tiel ke ĝi aperis kiel enkadrita, per girlando da tremantaj flametoj, de zono brilanta per vivaj steloj: ĉiu kredanto estis lumo antaŭ la altaro de Kristo. Mirinda vidaĵo; sed eĉ pli vera kaj samtempe simbola esprimo: ĉiu kredanto estas flamo, oferita al Kristo, lumo de la animoj, lumo de la mondo".

LA S.KONGREGACIO por la Defendo de la Kredo, t.e. de kontrolo por la konformiĝo ne al diskuteblaj opinioj de tiu aŭ alia teologia skolo, sed al la dia rivelo kaj al la eklezia instruado, publikis komence de februaro, la novan proceduron por la ekzameno de la doktrinoj ,

laŭ la nova spirito kaj kelkaj konkretaj ŝanĝoj inspiritaj de la Apostola Letero "Integrae servandae" de la 7-a de dec. 1965. En la arko de ĉi tiuj jaroj oni jam spertis kaj maturigis la proceduron. Laŭ ĉi tiu la libroj, publikaĵoj, prelegoj, k.s., pri kies doktrino estis agnoskite kompetenta la S.Kongregacio, estas disdonataj al la kongreso de spertistoj, kiuj kunvenas ĉiusabate. Ĉe esceptaj kazoj, kiam temas pri opinioj grave eraraj kaj danĝeraj al la kredantoj, oni sekvos la urĝan proceduron, t.e. oni informas rekte la episkopon aŭ episkopojn al kies diocezoj apartenas la kazo, kaj la aŭtoron, por ke li korektu siajn erarojn. Ordinare tamen, konsultantaro kaj spertista komisiono pridiskutas kolegie la materion, komisias du fakulojn verki sendepende unu de la alia siajn ekspertizojn, kaj elektas pledanton por aŭtoro, kiu, laŭ ĉiuj ricevitaj dokumentoj respondos al la konsultantaro denove kunigita. Grave estas la tasko de ĉi tiu pledanto: ĝi ne estas tute simple kiel tiu de ordinara advokato, ĉar li fakte kunlaboras al la kolegia esplorado de la ekzakta senco de la esprimoj ĉe la aŭtoro. Resumo de ĉio iros al la Kardinala Kongregacio, direktita de Kardinalo - Prefekto, kiu fine raportos al la papo por lia aprobo. Okaze de doktrinaj danĝeraj eraroj, oni invitos la aŭtoron ilin korekti skribe, aŭ se eble, voĉe antaŭ la S. Kongregacio. Kaj se tion li rifuzus, la Kardinala Kongregacio decidus laŭ oportuneco. Cetere, ĉar ne temas pri krima proceso, sed pri kontrolo, kiu enkadriĝas en la ordinara funkciado de la eklezia instrurajto, erare oni volus trovi ĉi tie plenumon de ĉiuj reguloj de la procesa juro.

PRI NULIGO DE GEEDZIĜOJ fare de la Sankta Roto aŭdiĝas kun teda insisto la akuzoj de la ekleziaj malamikoj, nome, ke la eklezio pere de tiu tribunalo deklaras

ne validaj aŭtentikajn geedziĝojn, metante la interesitojn en adulta situacio. Oni devas, male, agnoski, ke tiuj akuzoj devenas nur aŭ de profunda ignoro de la vero, aŭ de ĝia falsado. La plej granda nombro de la motivoj, esploritaj de tiu tribunado, rilatas la konsenton. Kiam oni povas demontri ke tiu konsento ekzistis ne reale, sed nur ŝajne, tiu tribunalo deklaras ne la nuligon de la geedza kontrakto, sed ĝian neekziston, ekde ĝia komenco. Ke la atestantoj estas veraj aŭ falsaj, tio estas ĝuste la afero, kiun la tribunalo devos zorge esplori. Sed, evidente, se la sentenco pro falsigo de la vero, estis erara, kulpo de ĉi tio apartenas al la trompantoj, ne al la tribunalo, kiu per longaj procesoj klopodis atingi ĉiujn eblajn garantiaĵojn. Kaj oni ne forgesu, ke ne ĉiuj procezoj finas per la dezirita nuliga sentenco, ĉar en la 90 % la sentenco estas negativa pro manko de sufiĉaj pruvoj.

LIA EMINENTA MOŜTO, Mons. Melitone, metropolito de Kalcedonio, sendita de Lia Sankteca Moŝto, la Ekumena patriarko Atenagoro, estis ricevita de la papo la 8-an de februaro. Kun kard. Willebrands, prezid. de la Sekretariato por Unueco de la Kristanaro, li pritraktis la problemon de la intensigo de rilatoj inter la du eklezioj kaj de komuna eldono de libro kun 283 dokumentoj interŝanĝitaj tiucele dum la lastaj 10 jaroj.

EN LA ANTAŬTAGO DE LA FESTO de la Sanktaj Cirilo kaj Metodio, la 12-an de februaro la papo ricevis grupon de ĉeĥoslovakaj sacerdotoj kune kun la seminarianoj de la slovaka instituto en Romo. Salutante la asistantojn de la ĉeĥoslovakaj elmigrintoj de diversaj eŭropaj landoj, la papo gratulis al ili por ilia fervoro, por ilia celo ĝisdatigi sian agadon, akceli vokiĝojn, esprimi fidelecon al la Petra katedro, gardi ĉe la elmig

rintoj la valoran riĉecon de la etnaj kaj civilaj tradi - cioj kaj ĉefe de la kredo, al ili transdonita de iliaj grandaj ĉielaj patronoj.

LA 14-an DE FEBRUARO antaŭ la kutima Anĝelus a pre ĝado la papo invitis la multnacian homamason kolektitan en la Sankta Petro-placo kuniĝi en preĝo kun la pola ka tolika popolo, kiu en tiu sama dimanĉo estis alvokita al preĝado por la prospero kaj la interna paco, post la san gaj tagoj de la ĵus pasinta decembro. "Alvenis horo - diris la papo citante la vortojn de la episkopa invito - post la malsukcesaj klopodoj, strebi ĉiujn fortojn por enkonduki ĉien la spiriton de la evangelio, ĉiam aktuala." Kaj plivastigante la rigardon al la tuta mondo, la papo aldonis: "Eĉ ni povas plilarĝigi la intencojn de ĉi tiu preĝo por la interna paco de ĉiu popolo, ĉefe de la lan doj premegitaj pro civila milito aŭ pro rifuzo de la fun- damentaj homaj rajtoj (inter kiuj tiuj de la religia libe reco), aŭ de maljusta kaj kruela subpremo, de ideologia propagando, organizita por malamo, interhoma luktado kaj perforto, de utopio pri radikala kaj kontraŭsocia kon testado, de revolucia memcela apologio kiel unika vojo por nova ordo. La interna paco de la popoloj - admonis la papo - diversmaniere estas danĝerigita: kie ne estas solidareco, frateco, komuneco de idealoj, de interesoj kaj komunuma sento, tie povas esti nek vera ordo nek komuna libereco nek trankvila paco. Necesas socia amo. Kaj por atingi ĉi tiun amon al la popolo oni devas pri- serĉi ĝin kaj celi al la fonto vera kaj supera, kiu es- tas Kristo. Ni ĉiuj bezonas tion. Hodiaŭ - konkludis la papo - ni preĝu por la civila paco, la interna paco de la popoloj, de ĉiuj popoloj en la tuta mondo".

600 MARŜADOJ INTER KIUJ NUR EN USONO 300 estos efektivigitaj inter la 7-a kaj la 9-a de majo en 40 ŝtatoj

por manifestacii favore al justeco kaj progreso. La marŝontoj kalkulas, ke ili kolektos tiamaniere preskaŭ 4 milionojn da dolaroj. Ĉar ĉiu junulo, kiu intencas plenumi la marŝadon, petos de familianoj kaj konatuloj kontribuaĵon por ĉiu piedironta kilometro. Fine, prezentante dokumenton, pruvantan la faritan marŝadon, li gajnos la promesitan helpon kaj sendos ĝin al la organizintoj. Ĉi tiu manifestacia marŝado naskiĝis antaŭ multaj jaroj en Britujo, kaj rapide la ideo disvastiĝis. Ĉifoje estas FAO, precipe ĝia tutmonda organizado kontraŭ malsato, kiu apogas la iniciaton. En Italujo la organizado estas farita de "Etenditaj Manoj", institucio meritriĉa, pro la multaj "mikroentreprenoj" en ĉiu mondparto kaj pro la kampanjo, kiu celas helpon favore al la problemoj de la subevoluinta mondo. Dum preskonferenco okazinta komence de marto en Romo, Silvio Ghielmi, prezidanto de "Etenditaj Manoj" klarigis, ke la fondusoj gajnitaj ĉiamaniere (oni antaŭvidas partoprenon de almenaŭ 100.000 personoj) estos tiel asignitaj: la 5 procento por agrikulturaj aprobitaj projektoj; 20 procento por instruado; 60 procento por mikroentreprenoj en Azio, Afriko kaj Sudameriko; 15 procento por la organizado de la marŝado. La internacia marŝado, kiu ricevis apogon de FAO kaj aprobon de Paŭlo VI, disvolviĝos laŭ 26 kilometroj de la grandaj romaj vojoj.

PRETENDO NE AKCEPTI la registarajn decidojn pri ĉefurba titolo de la novaj italaj regionoj, transpasis el Reggio Calabria al diversaj aliaj italaj urboj. En Reggio la situacio fariĝis tiel akra, ke fine, la registaro decidis interveni kun la armeaj fortoj. Fakte la materiaj absurdaj domaĝoj kaŭzitaj al sia urbo fare de la kontestantoj atingis la sumon de multaj mi-

liardoj; ne kalkulante la interrompon de industrioj pro la sinsekvaj strikoj, kaj la daŭra incito al malobeo kaj al perforto. Ankaŭ la ĉefepiskopo, mons. Ferro, kiu alvokis la loĝantaron de la plej kontraŭa urba kvartalo, Sbarre, al ordo kaj al paco estis interrompita kun kriadoj de kelkaj ekscititaj personoj en la preĝejo, kvankam la plej granda parto de la ĉeestantaro tre bedaŭris pri tio. Sed la postan tagon Mons. Ferro mem adresis leteron al la rektoro de la preĝejo kun kristanaj pacesprimoj, asertante, ke li "kompatas la ekscititon de la animoj post tiom da suferoj".

"SEKRETARIEJO DE AMIKOJ DE PATRINO Teresa" (v. K. S. n.on 2, paĝ. 21) funkcias jam de tri jaroj en Torino, iniciate de la Salesanaj patroj; interalie ĝi donis al la famkonata fratino ambulancon kaj ciklostilon por ŝia propagando, kaj donas asiston pri edukiĝo kaj vivrimedoj al diversaj pakistanaj infanoj: 30.000 lirojn por ĉiu pojare. La "Amikoj de patrino Teresa" sin devigas helpadi ĝenerale por 5 jaroj. Ili adoptis jam pli ol 40 infanojn. Antaŭ kelkaj monatoj ili sendis al ŝi 30 tajpilojn kaj 12 kudrmaŝinojn. En la ĉijara januara monato ĝi sendis 16 grandajn kestojn da kuraciloj. Oni kalkulas, ke dum preskaŭ 40 jaroj de porkaritata agado, patrino Teresa savis pli ol milionon da senesperaj malfeliĉuloj.

ĈE ARUA EN KONGOLANDO tri fratinoj de Instituto de la Tre Sankta Triunuo, la unuan fojon ekde la fondo de tiu instituto, faris siajn solenajn votojn. La reliĝiulinoj de tiu monakinejo vivas en severa klaŭzuro, dediĉante sin al Dio per preĝado, adoro, pentofaro kaj laboro. Tiu konvento, unika en sia speco, ĉar tie vivas nur afrikaj reliĝiulinoj, estis fondita de la diocezа episkopo Mons. Angelo Tarantino, kaj havas hodiaŭ

dekkvinon da junaj fratinoj.

LA DIOCEZO DE MAKENO, situinta en la norda parto de Sieraleono, estas 36.075 kv. metrojn vasta kaj havas ĉirkaŭ unu milionon da loĝantoj. La plejparto de ĉi tiuj estas musulmanoj. Kiam en la 1950-a alvenis ĉi tien la unuaj misiistoj, la vasta teritorio estis ankoraŭ sen lernejoj kaj la misia agado apenaŭ ektuŝis ĝin. Pro la malfacileco de la misiista laboro en tiu musulmana lando, la patroj faris el misiado socian servon, ne malzorgante la rektan misian agadon laŭ la eblecoj. Hodiaŭ pli ol la duono de la lernantaro frekventas katolikajn lernejojn. La lastaj statistikoj montras, ke la elementaj lernejoj estas 120 kun 14 mil lernantoj; 5 estas la mezgradaj kun 1.665 lernantoj. Kaj funkcias unu porinstruista kolegio kun 90 lernantoj. Oni starigis krome ses pensionojn por studentoj, kun 655 gastoj. La misiistoj asistas kaj direktas la diversajn entreprenojn, kunlabore kun fratinoj, lokaj kaj fremdaj instruistoj. La registaro alte taksas la kontribuaĵojn de la eklezio en ĉi tiu kampo kaj ĉiuokaze ili reliefigas dankeme antaŭ la loĝantaro la socian agadon de la misiistoj.

TANZANIO, KIU NASKIĜIS kiel nova Afrika respubliko la 23-an de aprilo 1964-a el kuniĝo de Tanganiko kaj Zanzibaro, estas unu el la afrikaj landoj, kiu plej rapide evoluiĝis socie kaj ekonomie. Politike ĝi estas socialisma, sed ĝi kapablis kuniĝi la politikajn principojn al la konkretaj afrikaj postuloj kaj tradicioj. En la 1968-a oni celebris la jarcentan datrevenon de la unua anonco de la evangelio en tiu lando. La Eklezio en Tanzanio estas juna, kompare al la historio de la Eklezio en Eŭropo; sed ĝi jam havas propran tradicion. Sed la plej bela progreso okazis en la lasta jar

centa kvarono: en 1948-a la katolikoj estis 664.000; dek jarojn poste ili jam estis pli ol miliono kaj en la 1968--a ili estis 2.350.000. Ankaŭ la nombro de la sacerdotoj kreskis, precipe, proporcie, la nombro de la indiĝenaj, kvankam ne laŭ la sufiĉa kvanto. Pasintjare, la socialisma politiko portis al naciigo de ĉiuj lernenoj gvidataj de misiistoj, kvankam estas alte taksata la akcelo donita de la eklezio por la instruado. Same oni timas, ke ankaŭ la porsanigaj ekleziaj institutoj baldaŭ estos rekviziciitaj de la ŝtato. Tiam ankaŭ alia subteno de la misia agado mankos. Sed la eklezio fidas en la pli granda helpo de la dia graco, kiu ne bezonas la kutimajn homajn rimedojn.

KARD. RUGAMBWA, ĉefepiskopo de Dar Es Salaam (Tanzanio) enoficigis la kapucenan p. Saracini kiel parokon de nova kvartalo de urbo Upanga, kiu havas 4.000 katolikojn afrikajn, hindajn kaj eŭropanojn. Nun tiu urbo havas ne nur parokon por italoj, kiuj estas tie multenombraj, sed ankaŭ la novan, por ĉiuj aliaj katolikoj. Krom misiistoj svisaj kaj nederlandaj, kiuj estas la plej nombraj, multaj aliaj religiaj institutoj, kiuj laboras interne de Tanzanio, havas "prokurejon" en Dar Es Salaam, kaj tiel ankaŭ la sacerdotoj komisiitaj por tiuj oficialaj reprezentoj, donas ian misian kunlaboron.

LA EPISKOPOJ DE LA DOMINIKA Respubliko petis de ŝtatestro Joaquim Balanguer, ke la registara programo por la familia planigo kaj naskiĝkontrolo ne estu devige efektivigita ankaŭ en tiuj hospitaloj, kie katolikaj fratinoj flegadas. Alie, ili devus revoki la fratinojn de tiuj porsanigaj institutoj.

EN LA HAITIA RESPUBLIKO patro Michel Welters atingis rimarkindajn sukcesojn en la familia kaj geedza kristana edukiĝo, disvastigante la "Legionon de Maria" kiu, laŭ lia aserto, kapablas mirinde spirite aliigi siajn membrojn. Reguligo de naskiĝoj kaj respondeca patreco, kiuj antaŭeŝajnis neeblaj, nun per la alvoko de la Dipatrino, patronino de la kristana familio, estas komprenitaj kaj sekvitaj de la plej simplaj insulanoj, plejparte analfabetaj. P.Lestapis asertas, ke la efiko de la sacerdota laboro dekobliĝas, kiam oni alvokas Marian, perantinon de ĉiuj gracoj, kaj la legionanoj konkure aktivadas pri religiaj kaj sociaj iniciatoj: fervoro de kristana vivo, popolaj misiadoj, lernejoj, sokurejoj, komunumaj asembleoj.

RILATE AL LA "Maria legiono" ni volas diri ion plie ĉar ĉi tiu tutmonda organizado montriĝis taŭga kaj tre efika ĉie ajn. Ĝi varbas fervorajn katolikojn, kiuj plenaj de la spirito de Maria, zorgas por la konstruado de la korpo de ŝia filo Jesuo. Ordinare temas ne pri personoj dotitaj de alta doktrino, sed de granda koro. Cetere Jesuo mem elektis siajn apostolojn el la plej humila medio: kaj kvankam li zorgis pri ilia instruado, ĉi tiu havis nur celon al progresema spirita vivo. La legionanoj, laŭ la konstato de diversaj animgvidantoj, havas la plej bonan sukceson kiam ili restas ĉe la fundamenta tasko, kio estas evangelizado. En la Filipinaj insuloj troviĝas ĉirkaŭ 8000 centroj de la Legiono. Kelkloke ili estas tro nombraj, tiel ke la pastro ne povas per si mem direkti ĉiujn. Tiel oni kreis laikajn spiritajn gvidantojn, kiuj estas aparte formitaj por anstataŭi la sacerdoton en la direktado al la spirita vivo de la membroj. Unu el ĉi tiuj pastroj kapablas tiamaniere labori pere de 80 centroj agantaj en sia vasta paroko, kiu komprenas vilaĝoj, kiujn li tre malofte povas vizi

ti. Kiam li alvenas, li trovas ĉion materie kaj spirite pretigita. Tre vigla la movado estas en Vietnamo, spite de la daŭra milito. Multaj mortis kiel martiroj dum tiuj apostolaj agadoj. En vilaĝo de lepruloj, iu sacerdoto kapablis organizi tri centrojn de la Legiono, kiuj siavice kristanigis du aliajn vilaĝojn. En la regiono de Tajlando, kie la kristanoj estas nur O,5 aŭ 1 %, la legionanoj po du vizitadas izolitajn kamparanajn familiojn kaj ĉiujn vilaĝojn. Ili petas de vilaĝestro permeson paroli al la loĝantoj kaj per ilia ĵargono ili povas paroli pri la katolika religio. Laŭ ebleco akompanas ilin katekisto; ordinare dum la unuaj vizitoj la pastro ankoraŭ ne ĉeestas. Li alvenos nur kiam la tereno estas jam religie preparita. En ĉi tiu Tajlanda regiono el 800 katolikoj, 110 estas legionanoj, en 5 centroj. Kelkcentoj da novaj kristanoj estis varbitaj de tiuj fervoraj legionanoj. Kelkloke ili projekcias religiajn filmojn, organizas pilgrimadojn, karitatajn entreprenojn. Centroj laboras en hospitaloj, malliberejoj, inter soldatoj kaj en seminarioj. En diversaj landoj tiu apostola aktiveco nomiĝas "Peregrinatio pro Kristo", kaj konsistas en malgrandaj grupoj (meznombre 10 legionanoj) kiuj iras al foraj lokoj, kie mankas sacerdotoj, ofte per aventurplenaj vojaĝoj, por ĵeti la reton de la dia vorto. La sacerdoto baldaŭ kompletigos ilian religian apostoladon. Tio fariĝis ordinara elemento en la vivo de la Legiono, kaj estas praktikata ĉe la plej diversaj regionoj, Afriko, Hindujo, en la du Amerikoj, Aŭstralio. En Eŭropo de multaj jaroj kelkaj grupoj iras lal Britujo kaj Svedujo. Antaŭnelonge aldoniĝis novaj landoj: Nederlando, Svisulo, Italujo, Turkujo... Kelkfoje la sukcesoj estas admirindaj, kaj la legionanoj revenas entuziasmaj kaj pli konsciaj pri la graveco de sia laboro. Speciala programo de la Legio, kvankam ne ĉefa, estas

kontribuo al socia kaj ekonomia progreso; la programo titoliĝas: "Vera sindediĉo al la patrujo". Tio iras de instruado teknika al fondo de kooperativoj; de valorigo de turismaj landaj aspektoj al konstruo de kanaloj kaj digoj; neniu socia agado por la akcelo de l' homa progreso estas fremda al la spirito de la legio de Maria. Tiel la legionanoj celas honoron kaj amon al sia ĉiela patrino, servante la mistikan korpon de ŝia Filo, la Eklezion. Karaktero ne sensignifa de la protekto de Maria al la Legio, estas ĝia absoluta fideleco al la Sankta Patro kaj al la eklezia instruado. Ne malmultaj legionanoj pro tiu fideleco donis ankaŭ sian vivon.

DU KATOLIKAJ ITALAJ SACERDOTOJ celebris la meson en Ĉinio, kaj ili sciigis, ke ili ricevis nenian malhelpon pri la vizo eĉ kiam ili deklaris, ke ili estas katolikaj sacerdotoj. Ili estas don Turrini kaj don Morini el la Kongregacio de la Servantoj de Maria. Kaj ili estas la unuaj, kiuj post multaj jaroj sukcesis pri tio, kvankam tio okazis nur en iu hotelo kun la ĉeesto de malmultaj personoj. Oni emas konsideri tiun fakton, kiel malstreĉigo de rilatoj post la liberigo de la amerika episkopo Walsh.

LA RIFUĜINTOJ EL PALESTINO, disigitaj laŭ multaj koncentrejoj en diversaj landoj de Mez-Oriento, estas ĉirkaŭ unu miliono kaj duono. Ili estas asistitaj pere de internaciaj organizoj, jam de pli ol dudek jaroj; sed la aktualaj kondiĉoj kaŭzitaj de la milito fariĝis pli kaj pli malfacilaj. Multaj celoj ĝis nun atingitaj laŭ la unuaj planoj, jam ne plu sufiĉas. La Unuiĝintaj Nacioj kaj aparte la organizo por la rifuĝintoj el Palestino (UNRWA) zorgis por la 335.000 lernantoj, per trejnado de palestinaj instruantoj, ĉirkaŭ

dumil sepcent ĉiujare. Ĉi tio, kio estas nur parto de la ampleksa asista agado, kion oni donas al tiuj kompatindaj rifuĝintoj, bedaŭrinde ne plu sufiĉas; kaj se la necesaj financaj helpoj, kiuj devenas de libervolaj kontribuaĵoj de kelkaj ŝtatoj, ne fariĝos pli intensaj, oni devos rezigni pri parto de la instrua organizo. Reprezentanto de UNRWA d.ro Mensour Khalid, delegito de la registaro de Kartum ĉe UNO, komisie de UNESCO, vizitis diversajn registarojn, kaj je la 14-a de februaro ankaŭ la Papon. La Sankta Seĝo kunlaboras en la karitataj entreprenoj de UNRWA, jam de sep jaroj, per ordinaraj kaj eksterordinaraj kontribuaĵoj; pro tio ĝi estas unu el la ŝtatoj plej interesitaj al la dolora problemo de la palestinaj rifuĝintoj.

LA EKLEZIO DE ALBANIO (ĉ.2.000.000 da enloĝantoj) dependas preskaŭ entute de la S.Kongregacio por Evangelizado. Sed plorinda estas ĝia situacio. Antaŭ la milito, Albanio havis 7 diocezojn, 150 sacerdotojn, 300 religiulinojn kaj 200.000 katolikojn. Kiam la komunista partio atingis la registaran povon, la diversaj religiaj konfesioj estis daŭre persekutitaj. En la 1948-a estis malliberigita la plej granda parto de la pastroj kaj diversaj episkopoj estis pafmortigitaj. Antaŭ ne longe la katedralo de Duraco estis disfaligita kaj tiu de Tirana malfermita. Kelkaj katolikoj, kiuj informis al Romo pri tio, estis mortkondamnitaj.

ĈAR ONI SUPRAĴE ASERTAS, ke la belga klerikaro estas en la plej avancinta linio en kontestado, ni ĝojas raporti pri deklaro farita kune de 420 belgaj sacerdotoj, plejparte de la diocezo de Tournai, kiu esprimas fidelecon al la eklezio, al la papo kaj al la episkopoj kun ĉi tiuj komunikantaj. Verŝajne tiu dokumento validas por multaj aliaj landoj. Ili deklaras, ke

ĝuste por kontraŭstari la krizon, kiu afliktas la eklezion, ili volas doni sian fidelecateston al la Sinjoro kaj al lia eklezio laŭ la direktivoj de la 2-a Vatikana Koncilo. Alte estimante sian vokiĝon, ili volas sin dediĉi al la speciala rolo de la sacerdoteco, kio estas evangelizado kaj sanktigado de animoj pere de preĝado, de kulto kaj sakramentoj, de predikado kaj religia instruado, de la spirita akcelo de fideluloj al subteno kaj servo de la dia regno en frata karitato. Pro tio ili deklaras, ke ili ne devas sindediĉi al mondaj interesoj:ili kontribuos al konstruo de la monda civito pere de sia specifa sacerdota misio. Ili deklaras kun ekstrema energio sian fidelecon al la sacerdota celibato, kiel al plej taŭga rimedo por dediĉi sin al Dio kaj al lia popolo, adaptiĝante laŭbezone al novaj sacerdotaj misikampoj, ekzemple en la labormedio. Ili eĉ respektas kaj subtenas la laikaron, kiu en la mondo havas sian rangon, kompetentecon kaj respondecon. Kaj laŭ la instruoj de la Koncilo, ili volas labori kune kun la laikoj por la ĉeesto de la eklezio en la mondo kaj por la progreso de la dia regno. Ili volas substreki absolutan fidelecon en sia predikado kaj instruado, al la integra katolika kredo, ricevita el la Sankta Skribo, el Tradicio kaj el la eklezia instrurajto. Kaj ili petas, ke pri ĉi tio la hierarkio estu ĉiam vigla kaj decida por la sekureco de la dia popolo. Ili agnoskas la eklezion, mistikan korpon de Kristo, tamen kiel institucion realan kaj videblan, kun strukturoj postulitaj de la homa socio, kvankam ĉiam perfektigeblaj. Ili malaprobas la batojn al la sankteca sento kaj al la realo de la peko kun ĉiuj iliaj danĝeraj sekvoj. Ili volas subteni pacon, justecon kaj fratecon inter popoloj kaj personoj; dum ili malaprobas ĉiun ajn perforton. Ili intencas diskonigi ĉi tian deklaron kaj klopodos ricevi aprobojn de la

plej ebla granda nombro de kunfratoj por solena atesto de fideleco al la eklezio.

OKAZE DE LA PREĜSEMAJNO por la unueco de la kristanaro D.ro Michael Ramsey, la Anglikana ĉefep. de Canterbury, konstatinte malpliigon de la fervoro ĉe multaj homoj, incitis la kredantaron al konfido:"Kristo volas, - li diris interalie - ke unueco fariĝu vere kaj perfekte. Kristo preĝadis tiucele suprenirante la Kalvarion, kaj lia aspiro plenumiĝis pere de Kruco kaj reviviĝo. Ankaŭ la ekumena movado havas siajn kalvarion kaj paskon. Ni tamen jam ekde nun povas danki Dion pro pluraj sukcesoj. Ni jam kapablas labori kaj preĝi kune kun niaj alikredantaj fratoj. Kaj tio estas jam kutima afero. Kelkaj kunigaj klopodoj inter diversaj kristanaj eklezioj bone sukcesis. En Azio, ekzemple, la Kunigita Eklezio de Norda Hindujo kaj de Pakistano. Pri la Roma eklezio unue ŝajnas al mi, ke la papa "motuproprio" pri miksaj geedziĝoj estas nova kontribuaĵo al la malfacilega problemo, se ĝi estos plene observita. Due, mi kun danko akceptas la vortojn, kiujn Lia Sankteco, la papo, diris la 25-an de oktobro : "Neniu absolute klopodo ekzistos malpliigi la legitiman prestiĝon kaj la riĉecon de pieco kaj de kutimoj de la Anglikana eklezio, kiam la Roma katolika eklezio povos ĉirkaŭpreni la ĉiam amatan fratinon en la aŭtentikan komunion de la Kristana familio..." La implikitaĵoj de la papaj vortoj, al kiuj mi tuj respondis kun sincera ĝojo, povos esti bone ekzamenitaj de la Romaj katolikoj kune kun la Anglikanoj, kaj tio estos precipe unu el la celoj de la Internacia Komisiono Anglikana - Romkatolika.

"LA TROJA ĈEVALO EN LA DIA URBO" estas titolo de libro verkita en la angla lingvo de prof. Dietrich von

Hildebrand, kun enkonduko de kard. Danielou. Ĝi baldaŭ aperos ankaŭ en la franca, kun enkonduko de Gabriel Marcel, Franc-Institutano. La aŭtoro, ĉiam fidela al la Koncilaj direktivoj kaj al la instruoj de Paŭlo VI, denuncas,energie la erarojn, bazitajn sur la asertita matureco, kiun la homaro estus atinginta, kaj kiu rajtigas rifuzon pri kredoj kaj eĉ dogmoj, taŭgaj nur por infanaĝo. Pro tio la aŭtoro estas severa ankaŭ kontraŭ la filozofio de Teilhard de Chardin. Prefere ol doni ĝeneralan rigardon al ĉi tiu libro vere rekomendinda, ni volas paroligi la aŭtoron mem, per tiu resumo, kiun li faras en la epilogo de la libro: "Ĉi tiu libro estis skribita pro la granda ĉagreno spertita,vidante falsajn profetojn eklevigi en la Dia Urbo. Ĉiam malĝoje estas vidi homojn, kiuj perdis kredon kaj malproksimiĝis de Eklezio. Sed multe pli malbone estas, kiam tiuj, kiuj vere perdis sian kredon, restas tamen en la eklezio, kaj kiel termitoj klopodas elinterne forvori la kristanan kredon, pretendante doni al ĉi tiu interpreton taŭgan por "modernulo". Ni memoru, kiuj estas la karakterizaj signoj de ĉi tiuj falsaj profetoj. Kiu ajn forneas la originan pekon kaj la neceson de l'homaro pri elaĉeto, nuligas pro tio la signifon de la krucumigo de Kristo: tiu estas falsa profeto. Tiu, kiu ne komprenas ke la elaĉeto de la mondo per Kristo estas la sola fonto de feliĉo, kaj ke nenio ekzistas, kion ni povas kompari al ĉi tiu mirinda fakto, tiu ne plu estas vere kristano. Kiu ajn ne plu agnoskas la unuan absolutan rangon de la unua ordono de Kristo-ami Dion pli ol ĉion - kaj asertas, ke nia amo al Dio povas esti montrita nur pere de amo al la proksimularo, tiu estas falsa profeto. Tiu, kiu proklamas, ke latuta moraleco ne estas unuloke en la rilatoj inter homo kaj Dio, sed en la aferoj, kiuj temas pri la homa bonstato, tiu estas falsa

profeto. Tiu , kiu ne plu perceptas la radikalan diferen-
con inter karitato kaj humaneca bonfaro, tiu fariĝis sur-
da al la Krista mesaĝo... Tiu, kiu pli zorgas pri la sur-
tera bonstato de l'homaro, ol pri ĝia sanktigo, perdis
la kristanan komprenon de la mondo... Ni estu singardaj
kontraŭ la falsaj profetoj, kiuj ne zorgas pri la insis-
taj admonoj de papo Paŭlo VI kaj pri la deklaroj tre pre-
cizaj de la Sankta Seĝo pri la diversaj herezoj, kiuj tra-
kuras hodiaŭ la mondon. Ni estu singardaj kontraŭ tiuj,
kiuj klopodas kovri la voĉon de la Kristvikario per sia
brua propagando". La aŭtoro tamen firme tenas, ke "la
inferaj pordegoj ne superfortos la eklezion laŭ la pro-
meso de Kristo (Mat.16:18) kaj finas ripetante la kre-
dajn vortojn: "Mi kredas en unu, sankta, katolika kaj
apostola eklezio".

PRI LIBRO DE PROF. HANS KUENG, titolita "Unfehl-
bar? Eine Aufrage" (Neerarebla? Demando) la Germa-
na episkopa konferenco donis severan prijuĝon, dekla-
rante, ke kelkaj principoj estas nepre akceptendaj, se
oni volas esti katolikoj. Temas pri diaj revelacioj ba-
zitaj sur la dia vorto del la Sankta Skribo.Kvankam la
kredo de la eklezio ĉiam devas esti esplorobjekto, kaj
kvankam pro tio ĝi estos nekompleta ĝis la fino de la his-
torio, tamen ĉi tiu kredo inkludas jes-ojn aŭ ne-ojn ne
pridubeblajn. Dogmo - deklaras la citita fonto - ne ri-
cevas sian devigan valoron el deduktoj de teologiaj dis-
kutoj aŭ el konsento de la plejparto de la eklezio, sed
el la karismo donita al ĝi por gardi la revelacion kaj
ĝin senerare instrui. Laŭ la Vatikanaj konciloj kaj laŭ
la eklezia tradicio, garantiantoj de la kredaj veroj es-
tas la ekumenaj konciloj kaj la Roma episkopo kiel pos-
teulo de la apostolo Petro, al kiu Kristo promesis spe-
cialan asiston, por ke li estu gvidanto de la episkopa ko-
legio kaj de la tuta eklezio. Kueng rebatis, dirante, ke

la episkopa deklaro ne kondamnis lian libron; eĉ ke neniam ili uzis la vorton: "senerara" pri la eklezia doktrino. Sed "L'Osservatore Romano" respondis ke eĉ ne eksprese kondamnante, la prijuĝo de la episkopa deklaro estas klara kaj severa. Ĉar la libro de Kueng aperis ankaŭ en la itala lingvo, la Itala Episkopa Konferenco (CEI) deklaris sian devon doni publikan malaprobon al ĝiaj tezoj, por ke la katolikoj scipovu sin defendi de la gravaj eraroj pri la senerareco de la eklezia doktrino, kiam ĉi tiu instruas sub la inspiro de la Sankta Spirito, rekonebla el la difinita maniero indikita de la konciloj.

"LUTERANA REFORMACIO KAJ HISPANA katolikismo" estos la centra temo de la Oka Internacia Sesio por Ekumenaj Studoj, kiu okazos en Salamanca en Hispanujo, de la 14-a ĝis la 18-a de aprilo. La renkontiĝo estis organizita kune de Ekumena Centro Johano XXIII en Salamanca, kaj de la Luterana Centro por Ekumenaj Studoj en Strasburgo - Francujo.

EN LA KATOLIKA TEOLOGIA fakultato de Budapeŝto 101 studentoj en la pasinta jaro sekvis la kursojn de la akademio. Mons. Gyoergy, ĝia rektoro informas, ke 24 inter ili estas laikoj, dum la aliaj estas jam sacerdotoj aŭ kandidatoj al sacerdoteco. Krom tiu teologia akademio ekzistas en Hungarujo ankaŭ kvar seminarioj por preparo de sacerdotoj.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONO AL NIA BULTENO UECI-CECR £1000(=$1,60) poŝtĝirkonto 3-7791: D.ro C.C.Ferrari; Viale dei Mille 37; 20129 Milano; aŭ al: pĝk. 1-37638. P. Giacinto Jacobitti; piazza S. Maria Maggiore 8; 00185 Romo.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo